# BRAZILA ESPERANTISTO

56-A JARO JANUARO - MARTO 1962 N.º 574-576

## RESENDE
## ŜTATO RIO DE JANEIRO



*PLACO ESPERANTO, en la urbocentro de Resende, solene inaŭgurita en la 17-a de Decembro 1962. Ĝi estas la 33-a strato dediĉita al Esperanto en Brazilo.* *(Teksto sur paĝo 15-a.)*

JANUARO-MARTO 1962

56-a Jaro N.º 574-576

# BRAZILA ESPERANTISTO

**("O Esperantista Brasileiro")**
Oficiala organo de

**BRAZILA ESPERANTO-LIGO**
Societo de publika utileco, laŭ registara dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro:
**A. CAETANO COUTINHO**

Respondeca redaktoro (redactor principal):
**D-ro CARLOS DOMINGUES**

Administracio kaj Redakcio:
**Praça da República, 54, 2.º**
Telefono: 42-4357
Sidejo de la Brazila Societo de Geografio
RIO DE JANEIRO — BRAZILO
**Senpaga por anoj de B. E. L.**
Eksterlande: unu dolaro aŭ 15 respondkuponoj

**QUOTA ANUAL DE ADESÃO À LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO 1962**

**(De acordo com os Estatutos todos os membros são automàticamente filiados à organização mundial)**

| | |
|---|---|
| Membro Simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brazila Esperantisto" .......... | 500,00 |
| Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista ....... ........... | 1.000,00 |
| Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto" ......... ......... | 2.000,00 |
| Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante . .. | 3.000,00 |
| Patrono-: recebe o mesmo que o Membro Assinante ............ | 20.000,00 |
| Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante ...... | 40.000,00 |

Tôdas as importâncias devem ser remetidas em cheque bancário ou vale postal à

**LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO**
PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.º
**Rio de Janeiro, GB**

## LEĜO PRI ESPERANTO

La Urbleĝantaro de Niterói (Ŝtato Rio de Janeiro) aprobis kaj la ĉefurbestro Wilson Pereira de Oliveira sankciis la leĝon sub n-ro 2224, de 27 de julio 1961, kiu deklaras societo de publika utileco Niterói Esperanto-Klubon.

Jen ĝia teksto en portugala lingvo:

DELIBERAÇÃO N.º 2.224, de 27 de Julho de 1961

A CÂMARA MUNICIPAL DE NITERÓI DECRETA E EU SANCIONO E PROMULGO A SEGUINTE DELIBERAÇÃO.

Art. 1.º — Fica declarado de utilidade pública o Niterói Esperanto - Klubo (Niterói Esperanto Clube), sociedade civil, com sede nesta cidade de Niterói.

Art. 2.º — Revogadas as disposições em contrário, esta lei entrará em vigor na data de sua publicação.

Mando, portanto, a todos a quem o conhecimento e a execução desta Deliberação competir que a executem e a façam executar e observar fiel e inteiramente como nela se contém.

Registre-se, publique-se e cumpra-se.

Prefeitura Municipal de Niterói, em 27 de julho de 1961.

*Wilson Pereira de Oliveira* — Prefeito

*U.E.A. ESTAS LA UNUSOLA ESPERANTA ORGANIZAJO INTERNACIA SIN OKUPANTA NUR PRI PROGRESIGO DE ESPERANTO.*

# BRAZILA ESPERANTISTO

56-A JARO JANUARO-MARTO 1962 N.º 574-576

# FUNDO DE EDIÇÕES

Para a Liga Brasileira de Esperanto foi sempre problema primordial a edição de livros. Ainda nos primeiros tempos, quando se tratava sobretudo de lançar a idéia da Língua Internacional e de estabelecer em bases sólidas o Movimento Esperantista brasileiro, a Liga publicou os livros didáticos indispensáveis, que serviram para a formação de muitos milhares de conhecedores do idioma. Apareceram também os livros de literatura. Assim, desde a fundação foram lançadas cêrca de cem edições, para as quais a Liga contou várias vêzes com a colaboração de entidades públicas ou particulares, colaboração essa que visou inclusive a demonstrar não ser o Esperanto língua de uma seita, mas idioma capaz de interessar todos os homens.

Projeta neste momento a Liga ampliar vastamente o seu acervo de edições e para isso está conclamando, em prospecto distribuído a esperantistas e amigos do Esperanto, a que dêem o seu apoio, pela forma ali exposta à constituição de um fundo especial de edições.

Mais de uma dezena de obras estão prontas para o prelo. O *Dicionário Português-Esperanto,* de A. Couto Fernandes, Carlos Domingues e Porto Carreiro que tão justos encómios recebeu na 1-a edição, reaparecerá duplicado; o *Guia de Conversação,* de Tobias Leite, foi revisto por Henerick Kocher e Luiz Alberto Brandão Martins; e o *Vocabulário Português-Esperanto* e *Esperanto-Português,* de Carlos Domingues, atenderá as exigências do uso geral.

No campo literário citam-se: *Provérbios Sinônimos* e *Amor por Anexins* — 3-a edição (Zamenhof-Couto Fernandes e Artur Azevedo — Couto Fernandes), *Antologia da Poesia Brasileira* (Pinto do Carmo-Lorenz), *Canaã* (Graça Aranha — Caetano Coutinho), *Inocência* (Taunay-Geraldo Pádua), *A Bagaceira,* (José Américo — Aldino de Freitas), *Juca Mulato* e *As Máscaras* (Menotti del Picchia — Geraldo Matos), *Clarissa* (Érico Veríssimo-Knoedt), *Poesias em Esperanto e sôbre o Esperanto* (J. B. Melo e Sousa) e *A Viuvinha* (Alencar-Porto Carreiro Neto) em 2-a edição.

Há várias outras obras em preparo ou projetadas.

Acentuemos com relação às traduções dessas obras literárias, a extraordinária contribuição que isso representará para a divulgação da literatura brasileira não só no mundo esperantista, mas ainda pela provável retradução para diversos idiomas nacionais.

E não esqueçamos que se até as chamadas línguas mortas continuam a viver graças aos seus imortais monumentos literários, o Esperanto tem a sua sobrevivência assegurada quando nada pelo tesouro dos milhares de

obras que constituem a sua valiosa livraria.

Ao organizar e lançar o seu fundo de edições a Liga deu o melhor do seu esfôrço, aproveitando a larga experiência adquirida no passado e ajustando-a às condições do presente. Também os autores e tradutores esperantistas trouxeram a contribuição da sua inteligência, capacidade e dedicação. É agora a vez do público esperantista que, convocado a uma nobre missão decerto trará a sua generosa e decisiva participação para o êxito completo da iniciativa da Liga Brasileira de Esperanto.

## ELEIÇÃO DA NOVA DIRETORIA

Às 16.30 horas do dia 30 de dezembro de 1961, na Praça da República, 54-2.º, reuniu-se a Liga Brasileira de Esperanto, em sessão ordinária de Assembléia Geral convocada na forma dos Estatutos para a eleição da Diretoria no período de 1.º de janeiro de 1962 a 31 de dezembro de 1965, com a presença dos delegados da quase totalidade dos grupos filiados, bem como sócios beneméritos, honorários e isolados. A sessão foi presidida pelo Dr. Carlos Domingues e secretariada por D. Rosa Aveleza de Sousa e pelo Dr. Luiz Alberto Brandão Martins. Iniciado o processo eleitoral, o Presidente, depois de ter nomeado para escrutinadores D. Maria do Amaral Malheiro e o Sr. Alfredo Maceira Rodriguez, mandou proceder à chamada dos votantes, que depositaram as suas cédulas na urna. Feita a apuração, verificou-se o seguinte resultado por unanimidade de votos:

DIRETORIA: Presidente — Carlos Domingues; Vice-Presidente — Ismael Gomes Braga; Secretário Geral — Luís Pôrto Carreiro Neto; 1.º Secretário — Francisco Ferreira da Costa Filho; 2.º Secretário — Luís Alberto Martins; Tesoureira — Irani Baggi de Araújo.

CONSELHO FISCAL: Henerick Kocher, Jorge Campos de Oliveira, Floriano Pessoa.

CONSELHO CONSULTIVO: Alcindo Brito, Antônio Caetano Coutinho, Augusto de Castro, Erlindo Salzano, Francisco Falcão, João Baptista Melo e Souza, Luís de Azeredo Coutinho, Otávio Viana Peixoto, Paulino Santiago, Wanderley Francisco Gonçalves.

Ao proclamar o resultado o Presidente agradeceu a prova de reiterada confiança que êle e seus companheiros acabavam de receber e prometeu tudo fazer para conservá-la no período que ora se inicia. Foi aprovado voto de pesar à estimada e infatigável batalhadora D. Lila Teixeira por motivo de seu falecimento em condições trágicas. Proponente o Cel. Jorge Campos de Oliveira. Foi apresentada pelo Prof. Henrick Kocker e pelo Dr. Luiz Alberto Brandão Martins proposta de alteração dos artigos 8.º, 9.º, 14 e 16 do Regulamento de Exame. Para dar parecer sôbre ela foi nomeada uma comissão composta dos Srs. A. Caetano Coutinho, F. F. da Costa Filho e Jorge Campos de Oliveira, devendo a matéria ser apreciada na próxima Assembléia Geral.

JEAN FORGE

Obras originais em Esperanto

ABISMOJ — romance ...... Cr$ 350,00

SALTEGO TRANS JARMILOJ — romance ............. Cr$ 350,00

MR. TOT AĈETAS MIL OKULOJN — romance ........ Cr$ 700,00

LA VERDA RAKETO — novelas satíricas do mundo esperantista ............. Cr$ 875,00

Charles Vivian

AMUZO PER SCIENCO

Trad. do inglês por D. R. Duncan. ed. de Associated Newspapers, Londres.

A mais divertida obra de vulgarização científica.

*Ilustrado, encadernado* ... Cr$ 630,00

**PRIVILEGIA VOJO**

**O livro recomendado por U.E.A. para o ensino universal do Esperanto Cr$ 300,00.**

SERVIÇO DE LIVROS DA LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

# 46.º CONGRESSO UNIVERSAL DE ESPERANTO

(*Conclusão*)

Dentre as preleções feitas podemos destacar a de Mag. W. Auld na "Internacia Somera Universitato" sôbre o tema "A Evolução da Poesia Esperantista", na qual abordou com consideração de alto nível cultural a diferença entre a prosa e a poesia, verificada na lingüística, ressaltando ainda a alusiva às rimas e ritmos, fazendo sentir que, embora sem um ritmo regular, êste se faz perceber.

No dia 11 de agôsto teve lugar, pela manhã, o "Cseh-Seminario", cujos trabalhos mereceram a atenção de quantos nêle tomaram parte. Usando o seu talento de mestre, o Prof. Andreo Ĉe, com a capacidade invulgar de que é dotado, fêz esclarecimentos sôbre o seu método de ensino, trocando informações com os assistentes, na maioria professores que ensinam pelo seu sistema.

Na mesma manhã teve lugar o encerramento do 31.º Congresso Esperantista de Cegos, no qual tomaram parte 50 indivíduos entre cegos e guias, de 10 países.

Veio, a seguir, em "Internacia Somera Universitato", a preleção do Prof. Hideo Yagi sôbre a "Essência da Arte Japonêsa", a qual foi muito aplaudida Nessa preleção êle declarou que muito influiram no povo japonês as culturas indiana, chinesa e ocidentais, porém o japonês criou a sua própria arte, cuja essência se encontra na "simplicidade do belo'.

Julga-se, disse o conferencista, que a beleza da arte existe não na forma, mas na idéia ou na alma. "Zen", uma seita do Budaismo, muito contribuiu para a criação dêsse conceito.

Relativamente à Academia de Esperanto, cumpre assinalar que lhe coube fazer discorrer em reunião pública sôbre o tema *"La senpera verbigo de adjektivoj kaj la principo de neceso"*. Presidiu aos trabalhos o Engenheiro Isbrucker, tendo comparecido cêrca de 250 congressistas. Desta feita, não sòmente os acadêmicos discutiram os temas apresentados, mas também o público tomou parte nas discussões. Acalorada foi a que ocorreu inicialmente, logo após o presidente ter submetido o tema à consideração dos presentes, na qual tomaram parte cêrca de 20 esperantistas. Resultou daí que as divergências foram tantas que na atual fase evolutiva da língua se tornou difícil, senão impossível, chegar-se a uma conclusão definitiva para todos.

Seguiu-se a inscrição das respectivas obras dos Autores, no "Libro-Budo", entre êles: G. Waringhien, Tibor Sekelj, Marjorie Boulton, Paul Neergaard, W. Auld, etc.

O Congresso Infantil teve oportunidade de levar a efeito na Casa Real de Banhos uma representação pública, em que tomaram parte as crianças do seu conjunto artístico, com tão grande número de assistentes que o salão de festas não o comportou. Houve canto, declamação, dança, recitais de piano, flauta etc. — Os aplausos foram calorosos, pela beleza dos números apresentados.

Tivemos, depois, o "Festival Artístico" — "Arte e Vida" sob a orientação do sr. Roland Dupuis, autor do programa, representando a Suécia. Tomaram parte nos aplaudidos trabalhos 29 elementos e grande côro. O teatro estava tomado quase que inteiramente. Constou do programa:

1. *"Pilgrimsento'*, canto pelo côro; 2. *"En monaĥeja Ĝardeno"*, cena e canto; 3. *"El la Pasia Vivo de Franz Liszt"*, teatro e música. Côro de adultos cantou texto em Esperanto com música de Wagner. Finalmente o côro infantil cantou cena dramática com música de Ketelbey. Por último o grande conjunto apresentou cenas da vida do compositor Franz Liszt, em honra ao seu 150.º aniversário.

Êsse programa agradou sobremaneira e foi muito aplaudido.

Ainda no "Festival Artístico" houve noite musical levada a efeito pelo "Côro Artístico Juvenil de Liubliana (Iugoslávia), o qual foi muito aplaudido também, dada a beleza de sua representação e a qualidade do concêrto, sôbre a peça "O Mediterrâneo Canta".

Guiou a orquestra o regente Vili Ŝĉuka, consistindo ela em 40 jovens esperantistas Logo na introdução foi apresentado "O Passeio à Beira Mar", de Mendelssohn e "Calmaria", de G. Verdi. Seguiu-se uma passeata pelo Mediterrâneo, com cantos espanhóis (*"Estis la flor"*, de J. Ramos; *"La Fiŝistineto"*, de E. L. Chavalri); franceses (*"Ĉirkaŭ la Kornico"*, de V. Scotto; *"La Mar"*, de Ch. Trenet). Depois, Itália (*"Malpermesita kanto"* de Napoli). A Iugoslávia foi representada por um *"kvarteto"* e depois por um *"okteto"* do mesmo côro. Tratou-se de cantos populares dálmatas (*"Kuŝas malsana"*, *"Ho Marija"* kaj *"Jen navigu..."*), e, a seguir um canto para Israel e outro para o Líbano.

Finalizando o festival, cantaram *"Ho mia kor"*, de Zamenhof, *"Milita Fablo"*, de J. Baghy, e *"Tuljak"*, canto estoniano.

Para encerrar os trabalhos veio o grande orador, dr. Ivo Lapenna, secretário geral da UEA que, em nome do LKK e dos diretores da UEA agradeceu em belíssimo improviso aos promotores do programa pela sua excelente escolha, dizendo que mal podia exprimir o sentimento de gratidão dos presentes para com os jovens que tão alto elevaram com seu exemplo a forma de trabalhar em favor do Esperanto.

## RESOLUÇÃO DO CONGRESSO

O 46.º Congresso Universal de Esperanto, ocorrido do dia 5 a 12 de agôsto de 1961, em Harrogate, com a presença de 1700 representantes de 35 países:

Constata com aprovação, que o Primeiro Festival Artístico Internacional enriqueceu ainda mais a cultura da língua internacional, e, conjuntamente com o seminário "Oriente-Ocidente" em Londres, deu novo estímulo ás finalidades da UNESCO;

Nota que, como conseqüência da Resolução do Congresso de Varsóvia e a decisão do Comité da Associação Esperantista Universal, de 15 de dezembro de 1959, paralelamente com o permanente crescimento dos valores culturais criados em Esperanto, já consideràvelmente se difundiu o ensino da Língua Internacional nas escolas;

Em conseqüência, exprime a opinião de que estão amadurecidas as condições para a subscrição de um Convênio entre Governos no sentido de paralela e simultâneamente conduzir-se o ensino do Esperanto nas escolas e em colégios destinados ao aperfeiçoamento de professores do idioma dos diversos Estados.

Em sendo assim, o Congresso recomenda ao setor responsável da UEA continuar intensificando seus esforços, a fim de conseguir atingir tal meta.

*F. S. Almada*

# XVII-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

## DIVERSAJ FAKTOJ

### *Saluto en la Ŝtata Parlamento*

Deputito Moab Caldas faris la 13-an de Oktobro en la Ŝtata Parlamento elokventan salutparolon, en kiu li akcentis la grandan signifon de Esperanto por la bono de la Homaro, skizis la historion de la Internacia Lingvo kaj reliefigis la genian rolon de Zamenhof. Li ankaŭ aludis al la sukceso de la Kongreso, kiu havis la partoprenon de brazilanoj kaj de esperantistoj el la amikaj najbaraj landoj.

### *Kunlaboro de Pepsi-Cola*

La grava fabriko de la malvarma trinkaĵo *Pepsi-Cola* donacis al la Kongreso sep grandajn rubandojn kun bonvenigaj vortoj al la kongresanoj. Tiuj efikaj rubandoj estis uzitaj ĉe la stratoj kaj ankaŭ sur la ekskursaj omnibusoj, vekante ĝeneralan atenton.

## PARA O XVII CONGRESSO BRASILEIRO DE ESPERANTO

Mais um Congresso de Esperanto, desta vez realizado no importante Estado do Rio Grande do Sul, põe em evidência a vitalidade do movimento nacional esperantista no Brasil, graças ao trabalho perseverante e seguro, da LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO.

Evidentemente, não poderia ser compreensível de outro modo, de vez que o Esperanto já não pode ser, de modo algum, considerado como simples sonho idealístico, mas como uma grande realidade consolidada por inequívocas conquistas no mundo social, intelectual e científico, entre elas o fato de achar-se credenciado como candidato ao PRÊMIO NOBEL DA PAZ, o que vem demonstrar a indiscutível influência da língua auxiliar na pacificação dos povos.

Compreende-se bem que, no estado angustiante em que se encontra o mundo ante a perspectiva da hecatombe de uma nova guerra, todos os povos sintam o instintivo anseio de uma aproximação mútua; mas a barreira tremenda da diversidade de línguas constitui uma dificuldade enorme, já não insuperável graças ao influxo eficiente do Esperanto triunfante.

A efetivação de mais um importante conclave esperantista dessa natureza, demonstra da parte da *Liga*, uma organização de trabalhos que exige de cada esperantista todo o possível esfôrço no sentido de colaborar para a condução do Esperanto ao alcance de sua definitiva vitória.

Não podemos deixar de reconhecer que a deflagração de uma nova guerra, deploràvelmente esperada, virá pela terceira vez, entravar a marcha do imperecível objetivo humano do grande mestre Zamenhof; mas, por isso mesmo, todos os esforços devem ser empregados para a consolidação das bases dêsse elevadíssimo ideal em que o sentimento de solidariedade humana se revela como a maior inspiração divina para a felicidade dos povos.

Não se trata mais de um sonho que venha possibilitar aos pessimistas o direito de descrer, pois que o Esperanto é um fato objetivo em todos os ramos de atividade intelectiva, contribuindo de maneira eficaz e indubitável para a unificação da idéia de confraternização, fundamento de tôdas as religiões.

Seja, portanto, o nosso XVII Congresso Brasileiro de Esperanto mais uma poderosa alavanca impulsionando, através de resoluções eficientes e de efeito seguro, o Esperanto para a alta finalidade a que se destina.

A mentira se contrapõe à verdade, a treva à luz, a dúvida à certeza. Tem sido e será sempre assim, através de todos os tempos e graus de evolução, mas se tôdas as negativas e dubiedades são apenas a ausência da fôrça positiva, têm que desaparecer ante a evidência substancial do fato, que não falha.

Assim, neste momento, tôdas as vistas dos esperantistas brasileiros estão voltadas para o nosso XVII Congresso, na certeza de que será êle um Certame da mais alta expressão para o esperantismo brasileiro ou antes uma vigorosa contribuição para o movimento esperantista mundial.

Impossibilitado de comparecer pessoalmente, além de outros motivos por precariedade de saúde, envio com a

**(Continua na pág. 21)**

# LILA TEIXEIRA



Lila forlasis nin, forlasis Esperanton, forlasis ĉion... por ĉiam! Kial? Nerespondebla demando.

Skribante ĉi tiujn liniojn, ŝajne mi vidas tiun gajan personon, kiu plenigis niajn kunvenojn per sia bonhumora babilado kaj rido kaj estis amata de ĉiuj. Ŝi ne estis juna sed ŝia fizika aspekto ne indikis sian aĝon, kvankam, ŝiaj haroj estis tute blankaj. Nia magnetofona aparato registris kaj konservas en sonbendo montron de tiu gajeco rikoltitan sen ŝia kono antaŭ la komenco de unu el niaj kunvenoj.

Vigla, ĉiam preta por labori por Esperanto, ĉu en la sidejo ĉu ekstere, ŝi estis plena de entuziasmo kaj dediĉo, kaj neniu, kiu konis ŝin povus imagi, ke la vivo por ŝi estas peza ŝarĝo, ke sekreta doloro malfeliĉigas ŝin. Poste mi konstatis, ke bedaŭrinde ŝi ne estis ĝoja persono sed nur gaja.

Tial, kiam en la mateno de la 20-a de Novembro 1961 per telefono ni ricevis la malĝojigan sciigon, ke ŝi ĵus forpasis pro memvola tragika akcidento, ni sentis grandan baton pro la terura kaj bedaŭrinda okazaĵo.

Ŝi estis brazilanino, el Campinas, São Paulo, sed ĉar ŝi pasigis siajn fruajn jarojn en Portugalujo, oni povis pensi pro ŝia prononcmaniero, ke ŝi devenas de tiu lando.

En 1951 ŝi esperantistiniĝis en kurso organizita de la Asocio de Radiogimnastikuloj; poste ŝi enmatrikuliĝis en la Supera Kurso gvidata de D-ro Carlos Domingues kaj partoprenis en la konversacia kurso de B.K.E. Ŝia vivanta deziro estis pligrandigi sian konon kaj ŝi klopodis tion fari studante kaj legante bonajn librojn.

Ŝi sin okupis pri ĉio, kio estis bezonata. Interne, ĉe la sidejo, ŝi ne nur kolektis eltranĉaĵojn de ĵurnaloj rilatajn al Esperanto kaj algluis ilin en albumoj sed klopodis por ke ĉiuj samideanoj loĝantaj for de Rio de Janeiro kaj ankaŭ ĉi tie provizu ŝin de tiaj eltranĉaĵoj, pliriĉigante tiel la arkivon de la Ligo.

Kiel Fak-Delegitino de UEA ŝi prizorgis demandojn kaj petojn faritajn el eksterlando. Ekzemple: ne longe antaŭ ŝia morto por plenumi peton pri la nomo Bingen en Brazilo ŝi skribis al Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko kaj ankaŭ al "Pergunte ao João" (Demandu Johanon), interesa sekcio de radistacio Jornal do Brasil kaj de la grava samnoma ĵurnalo. Bedaŭrinde pro ŝia morto ŝi ne povis doni la finan respondon.

Laŭ peto de S-ro H. Ogata ŝi sendis al Ube, Japanujo, semojn por la ĝardeno de Yamaguĉi Medicina Kolegio kaj kun la valora kunlaboro de S-ro Gualberto Franco Pires, Direktoro de la lernejo de Teksa Instruado de la Nacia Servo de Industrio, en Bangu, ŝi plenumis peton de Sapporo Esperanto Societo pri interŝanĝo de infandesegnaĵoj.

Dum la Centjaro de Zamenhof ŝi multobligis siajn penojn por helpi la Prezidanto de BEL; ŝi prenis sur sin plurajn taskojn kaj inter ili klopodi por ke la Nacia Muziiklernejo helpu al organizado de programo honore al la kreinto de Esperanto kaj, kurioza okazaĵo, ŝi propravole telefonis al la loĝantoj de la strato Zamenhof kun informo pri Z. kaj invito al la solenoj.

Dum la preparo de la Specimena Foiro en kvartalo São Cristovão ŝi vizitadis la Organizan Komitaton kun la celo, ke ili publikigu prospektojn de la Foiro ankaŭ en Esperanto laŭ la ekzemplo de alilandaj foiroj.

Ŝi multe laboris, por ke en la Lernejo Polônia en la antaŭurbo Magalhães Bastos, Zamenhof estu memorigata tie. Ĉiu ĉambro de tiu lernejo estas dediĉita al fama polo, kaj en la nomo de BEL ŝi vizitis la Direktorino de la Lernejo kun sugestio, ke ankaŭ unu ĉambro estu dediĉita al Z. kaj feliĉe la Direktorino tre bone ricevis la sugestion kaj elektis la Bibliotekon por ricevi lian nomon kaj tie solene estis starigita lia portreto.

Lasttempe kiam la Universitato de Brazilo kaj Centro de Universalaj Studoj kaj Interŝanĝoj (Brazilo-Pollando) organizis solenon por celebri la tagon de Pollando, Lila sukcesis, ke en la ekspozicion de polaj libroj oni enmetu ankaŭ la esperantajn tradukojn de pluraj libroj en Esperanto pruntedonitajn de la biblioteko de BEL.

La bildo montras ŝin ĉe la enirejo de la Universitato de Brazilo dum la ekspozicio.

Rilate librojn ŝi instigis Nacian Instituton de la Libro interesiĝi pri eldonaĵo de BEL, kaj en la centjaro de Machado de Assis ŝi sukcesis konvinki tri el niaj plej gravaj librejoj enmeti la verkon Teatro de Machado de Assis en Esperanto en montran fenestron apud aliaj verkoj de tiu fama verkisto.

Senlace ŝi helpis Brazilan Klubon "Esperanto". Por ĝiaj kunvenoj ŝi estis ĉiam pripensanta novajn allogajn ludojn, kiujn ŝi ĝoje prezentis ĉiusabate; ŝi prizorgis ankaŭ la duonjarajn tagmanĝojn de la Klubo kaj ŝia kunhelpo senigis K-lo Campos de multaj organizaj laboroj.

Sed unu el la ĉefaj laboroj de Lila estis la kurso, kiun ŝi okazigis en Unuiĝo de la Laboristinoj de Jezuo por la infanoj de tiu organizaĵo kunhelpata de S-ro Aveleza de Sousa, la instruanto. La libroj kaj poste la diplomoj disdonitaj al la gelernantoj estis donacoj ŝiaj.

Ne nur laboro ŝi oferis al la Movado. Ŝi malŝpareme donacis librojn al la Foiro de la Asocio por Batalo kontraŭ la Kancero kaj al BEL plurajn aĵojn inter ili bonegan Magnetofonan aparaton multkostan kaj belajn manfaritajn paĝindikilojn por disvendado. Al BKE ŝi donacis la konatan ludon pri krucvortoj.

La sindonemo de Lila al la aferoj koncernaj Esperanton kaj la Movadon estis, kiel vi vidas admirinda. En la Urba Teatro ŝi klopodis, por ke estu registritaj en disko la Brazila Himno kaj la Espero kaj ĉe la Brazila Instituto de Kafo ŝi agis por la uzado de Esperanto en la propagando de nia kafo.

Mi citis nur kelkajn faktojn, sed ili sufiĉu por montri, ke en Lila ni vere povis konstati la ĝustan sencon de la Esperanta signifoplena vorto "sindona" tio estas "donanta sin".

La loko, kiun tiu samideanino okupis ĉe BEL kaj BKE estos malfacile plenigebla.

*Irani Baggi de Araújo*

# ? LA MISTERO ROMANO

*Afrânio Peixoto, Coelho Neto, Medeiros e Albuquerque kaj Viriato Correia*

## XLV

## MALFELIĈO MALOFTE VENAS SOLE

Post la aventuro ĉe la kvartalo Gávea, kie pro la ĝustatempa interveno kaj pro la abnegacio de Albergaria, Lucilia kaj la onklino estis savitaj el la manoj de Mendes Guerreiro kaj de liaj maskitaj kunuloj, la virinoj akceptadis la junulon en sia domo, la malriĉa dometo ĉe la strato Paulino Fernandes, amike kaj senceremonie por vizito kelkhoraj longaj. La bona sinjorino Bibi ja komprenis ilian reciprokan inklinon, estis informita pri la pruvoj de amikeco donitaj de li al Lucinda en la unua nokto de ilia renkontiĝo en la distrikta policejo, kaj ĉe la demandado en la sekvinta tago, vidis ilin rigardantaj unu la alian: la junulino, tute sola, ĉe la fenestro kontraŭ sia kutimo, li diskrete sub la protektanta ombro de la stratlampo.

Pro tio post lia freŝdata nobla agado, kiu ankaŭ al ŝi profitigis, ŝi venkis ĉiujn barojn de sia antaŭzorgo de prudenta maljunulino kaj malfermis la pordon kaj la koron al la aventurema kaj sindona junulo.

Lucinda kaj Petro senlime ĝojegis kaj tiuj tagoj, pasigitaj de personoj, kiuj havis komunan pasintecon plenan je emocio, kvazaŭ plimallongigis per reciprokaj korelverŝoj tiun malsekuran kaj dolorigan periodon, dum kiu la amo, kiel ordinare, ludis la blindulon sin turmentante pro malfacilaĵoj kaj kontraŭaĵoj. Ili gefianĉiĝis sed sen ia protokolo, sen la oficiala peto kaj sen la konvencie faritaj promesoj.

Ili atendos nur la disvolviĝon de la afero ĉar nun jam ne estis dubo — Lucinda estos la heredantino de la milionoj de Sanches Lobo, ŝi loĝos en palaco, multaj servistoj servos ŝin kaj ŝi havos aŭtomobilon, la edzo certe fariĝos altrangulo, al kies aktiveco kaj talento nepre venos okupo kaj socia reliefo.

Tamen io ĉagrenis Petro Albergaria. Ne temis nur pri la penso, ke li murdis per siaj propraj manoj tiun malbonan fiulon Sanches Lobo, kiu meritis morti multfoje pro siaj multaj krimoj. Li estis certa pri la senpuniteco, la enketo estas finita, iu memkonfesinta krimulo, nun forkuranta kaj morgaŭ kaptota, respondos por ĉiu. Ne, ĝi ne estis tio. En sia konscienco li estis la murdinto de ŝia patro, de la patro de sia amatino, sia estonta edzino...

Estas vere, li diris, por senkulpigi sin, ke li ne sciis tion, kiam li murdis Sanches Lobo kaj eĉ tiu fakto ebligis ilian interrilatiĝon, la plenumitajn servojn kaj fine la amon, la geedziĝon, la riĉecon. Li estis komisiita de sia patrino, je ŝia lasta horo kaj kun ĵuro por venĝi ŝin, kaj tiun filan devon li plenumis. De tiu flanko li do estis pravigita. Tamen restis la prenita mono, la ducent mil milrejsoj kaj la saketo kun oraj moneroj, kiujn li metis en la skatolon. Li konsideris ilin kiel kompenson, redonon de tiu, kiun la fiulo forprenis de liaj gepatroj, laŭ la ofta rakonto de la patrino. Sed la penso pri la uzo de tiu mono rericevita kostopage de sango embarasis lin. La amo estas granda artisto, kiu plibonigas la korpon de la homoj por la granda komunikiĝo de la naturo, sed ne malatentas la spiriton Se Albergaria, la skeptikulo de la *bona-farita-krimo* ne sentis konsciencriproĉon, ĉar la animo, kiu malamas estas hardita, tamen li havis skrupulon, ĉar delikata estas la koro, kiu amas.

Kaj jen, ne propravole, sed kiel faro de la Providenco lia domo konsumiĝis en granda incendio kaj kun ĝi la malbone akiritaj riĉaĵoj, kiujn li savus se li povus, kiujn li eble defendus per la propra vivo se tio estus necesa, kiuj nun estas perditaj por ĉiam. Eble kvazaŭ por konsoli sin (ĉar estas multaj nelogikaĵoj en la konscienco), li preskaŭ plezuriĝis pro la okazintaĵo.

Ĝi devis okazi tiel... Eble ĝi estis pli bona tiel!

Ne plu ŝargita de la granda premo — tiu de la skatoleto malaperinta inter la ruinoj — kaj purigita de la plej malbela aŭ de la plej abomena el la krimoj, senigita je ĉio kaj pro tio senzorga, Petro iris al la strato Paulino Fernandes por rakonti al sia fianĉino la malfeliĉon, kiu senigis lin de lia sola propraĵo konsumita de la fajro. Li pensis aldoni, ke li ankaŭ perdis sian ŝparitan monon per kiu li intencis pretigi

siajn vestarojn, sed li forpelis la ideon, kiu ŝajnis al li ironia kaj malbonsigna. Ŝparita sumo... ne, li ne mencios tion. La cetero suficus por veki la kompaton de la amo.

Ĉe la alveno, Lucinda ne tuj sin prezentis kaj kiam ŝi enpaŝis ŝiaj okuloj estis plenaj de larmoj.

— Kio okazis? Mi venas por rakonti al vi malfeliĉan okazintaĵon kaj mi trovas vin tiele... Kio okazis?

— Kia ajn estas via malfeliĉo, pli granda estas nia... Legu tion...

Kaj ŝi etendis al Albergaria du paperojn, kiujn li avide legis. La unua tekstis jene:

"Lucinda. Legu ĉi tiun leteron per la koro, leteron skribitan de nia patrino al mi, ĝi rakontos al vi multajn aferojn, kiujn vi neniam devus scii, sed kiun nun vi nepre devas ekkoni. Onklino Bibi konas mian skribaĵon kaj se ŝi ne kredas min ĉar ŝi ne konas ankoraŭ mian plendindan vivon, ŝi ne dubos pri tiu, kiu estis ŝia plej amata fratino, nia patrino, la plej malfeliĉa el la patrinoj..."

Petro finis la legadon, ne komprenante bone. Lucinda do havas fratinon, pri kiu ŝi neniam parolis pro tio, ke ŝi ne ŝin konis. Tamen la skribado ne estis al li nekonata; ĝi similis al tiu de la anonima letero, kiun li ricevis antaŭ kelkaj tagoj!

Li malfermis la alian, flavigitan de la tempo kaj kun signoj de larmoj, kiuj malhelpis al li la legadon:

"Mia filino. Vi ricevos ĉi tiun, kiam mi ne plu vivos, elaĉetinte per la morto la krimon perfidi la memoron de via patro, per alia edziĝo, kiu senigis min je mia unua filino Mi parolas nur pri la morto, kiu tamen estas la paco; pri la cetero mi nenion diras — humilaĵoj, turmentoj, kruelaĵoj, perfidaĵoj sennombraj, kiujn mi suferis de la monstro, kiu faris ankoraŭ pli: priŝtelis la koron de mia filino, malhonorigis min je miaj propraj okuloj, konsumis mian junecon per ĉagreno, malriĉigis min kaj ĵetis min en mizeron kune kun tiu malfeliĉulino, via fratino Lucinda, kiun mi donis al via onklino. Se vi iam pardonos min zorgu pri ŝi. Zorgu pri ŝi, mia filino, tiun komplezon mi, kun interplektitaj manoj, petegas de vi je la horo de mia morto, por malebligi, ke la monstro faru al ŝi saman malbonon, kian li faris al ni ĉiuj. Venĝu min, se tio estos en via povo. Vi havos plurajn helpantojn en la malamo ĉar pluraj estas la malfeliĉuloj, viktimoj kiaj ni. Se vi povos, atentu al Pedro Albergaria, filo de Sanches Lobo, kies patrino, mia malfeliĉa amikino Leonor, suferintino de la sama malnobla viro, postlasis al li malamon tute similan al mia. Malhonorigite de li, poste forlasita en mizero kune kun la honorinda viro, kiu kovris ŝian malhonoron—la filon de la malbonulo. Tiu ne uzas la nomon de la abomeninda patro, sed de la alia kaj scias nenion pri tiu afero. Li estos, se Dio tion permesos, la venĝonto de ni ĉiuj. Pririgardu lin, se vi povos kaj konservu ĉi tiun teruran sekreton, kiu siatempe oni nepre postulos de vi. Se li malsukcesos, mi fidas je la dia justeco, ke ĝi aperigos iun alian por puni en ĉi tiu mondo la malŝatindulon, kiun la infero arde deziras posedi kaj kie li restos por ĉiam. Pardonu min, mia filino. Preĝu por via malfeliĉa patrino. Zorgu pri Lucinda. Ĝis la dato de la lasta juĝo!

*Lucia.*"

Petro Albergaria apenaŭ povis fini la legadon. Kvazaŭ frenezulo li ĉirkaŭturnis la rigardon, liaj haroj stariĝis, kun elorbigitaj okuloj kaj malfermegita buŝo kaj pugnofrapante la kapon li volis diri ion, sed ne sukcesis paroli kaj falis senkonscie.

La du kompatindaj virinoj alkuris rapide, malfacile sukcesis meti lin sur la sofon kaj Lucinda malfermis la fenestron por vidi ĉu estas iu, kiu povos voki la Ŝtatan Urĝan Helpon. Neniu sur la strato. Sinjorino Bibi petis vinagron. Ŝajnis, ke la junulo spiras kaj rekonsciiĝas.

Lucinda trankviligita kaj reakirinte la kvietecon, ke la konfuzo de la helpoj forprenis, ekploris, tenante en siaj manoj unu el la manoj de Albergaria.

Kompatindulo — pensis la junulino — li tiele amas min, ke ĉe la scio, ke li estas mia frato... tio okazis...

Kaj la larmoj varmaj kaj abundaj denove falis rapide sur ŝian delikatan vangon.

Albergaria iom post iom rekonsciiĝis.

— Kio estas? Kio okazis?

— Nenio... ripozu, estas nenio, trankviliĝu.

Li penis eksidi helpate de la maljuna virino. Lucinda karesis al li la harojn per kompata kaj ama gesto...

— Petro, estas necese, ke vi rezignaciu pri tio. Vi ne perdis ĉion... Vi perdis vian fianĉinon, sed vi trovis vian fratinon...

# BRAZILA KRONIKO

## PARÁ

*Belém* — Nia sindona sam. Francisco Falcão organizis bonegan Esperantan ekspozicion en la Publika Biblioteko de Belém, kaj faris paroladon pri la Internacia Lingvo Zamenhofa, kun la ĉeesto de reprezentantoj de la Ŝtatestro, de la Komandanto de la 10-a Milita Regiono, de la Admirala-Komandanto de Marista Ŝiparo, de la Ĉefurbestro de Belém, de la Rektoro de la Universitato de Pará.

## RIO GRANDE DO NORTE

*Natal* — En mallonga vojaĝo, kiun la Prezidanto de B.E.L., D-ro Carlos Domingues, faris al tiu urbo en la lasta Decembro, li amike vizitis S-ron Arlindo Castor de Lima, nian tiean Delegiton kaj Prezidanton de Esperanto-Asocio de Rio Grande do Norte, kun kiu li detale parolis pri la lokaj aktivecoj, inkluzive per regulaj artikoloj en la gazetaro kaj per programoj en la radistacioj. Kun nia sindona samideano, inteligenta ĵurnalisto kaj radiisto, la Prezidanto de B.E.L. vidis la placon "Esperanto", en la kvartalo Petrópolis, kaj poste iris ankaŭ al la placo "Zamenhof", en la kvartalo Alecrim.

Kaj alproksimiĝinte, ŝi premis sur la frunton malsekan de angora ŝvito castan kaj dolĉan kison.

Albergaria ektremis...

*Afrânio Peixoto*

Esperantigis Y.

**VI BEZONAS U.E.A. — U.E.A. BEZONAS VIN.**

## PARAÍBA

*Lagoa Sêca* — Pastro Valeriano Barreira, ĉe Colégio Ser a fico, klopodas por nia lingvo internacia kaj esperas baldaŭan bonan rezulton.

## PERNAMBUCO

*Recife* — La 14-an de julio Associação Pernambucana de Esperanto memorigis la 74-an datrevenon de la apero de la "Unua Libro de D-ro Esperanto", en 1887. Ĝi okazigis solenan kunsidon. Nia sam. Moacir Cunha paroladis pri la deveno de la lingvo internacia kaj pri la paralelo inter la du tagoj 14 de julio : la okupo de la Bastilo kaj la apero de Esperanto. Prezentita de la deputito Nivaldo Machado, la Ŝtata Parlamento aprobis gratulan deziresprimon al A.P.E., por la 74-a datreveno.

La gazetaro donis notojn pri la memoriga dato. "Diário da Noite" presigis intervjuon kun s-ro Francisco Ristal, prez. de A.P.E. La radistacioj disaŭdigis informojn pri la afero. Pastro Barros Leal kaj F. Ristal partoprenis programon ĉe Televisão Radio-Clube pri la movado esperantista. La butikofenestro de Camisaria Confiança, ĉe la centra strato Nova, prezentis belan ekspozicion de Esperantaĵoj, kun la busto de D-ro L.L. Zamenhof.

## BAHIA

*Salvador* — Por renkonti alilandan esperantiston venintan el Usono, nia samideano Manoel Borges dos Santos vojaĝis el Muritiba, kie li loĝas, al Salvador, la 8-an de decembro. La du samideanoj havis okazon ĝoje, flue interparoladi. Tio tre kontentigis la brazilan samideanon, kiu, loĝante en la internlando, tre malofte povas renkonti fremdlandajn esperantistojn.

*Muritiba* — La Komunuma Leĝo n-ro 159, de 7 de decembro 1960 donis la nomon — *DR. ZAMENHOF* al grava strato en tiu ĉi urbo.

La Framasona Loĝio Muritibana Frataro decidis apogi la Esperantan Movadon kaj intencas starigi E-kurson, sub la gvidado de nia sam. M. Borges dos Santos.

La Gimnazio Castro Alves starigis nedevigan E-kurson, kiun sekvas pli ol 30 gelernantoj.

*Mataripe* — Organizita de nia sam. inĝ. Floriano Pessoa, okazis (20-27 aŭgusto) ekspozicio de esperantaĵoj (libroj, revuoj, prospektoj, ŝlosiloj, flugfolioj k.c.) Vizitis ĝin granda parto de la loĝantaro.

## MINAS GERAIS

*Monte Santo de Minas* — Eymard Esperanto-Klubo kaj SEMO (Seminariana Esperantista Movado) okazigis du festojn ĉe Escola Normal Américo de Paiva kaj Seminario Sacramentino Beato Eymard, la 22-an kaj 23-an de julio. Estis simplaj sed interesaj la programoj de la festoj, kun muziko, deklamado de Esperantaj poeziaĵoj k.a.

Je la 9-a matene diris meson Pastro Pedro Cerri, kiu faris predikon pri la esperantista idealo kaj la Diordono pri amo reciproka. Vespere okazis festa kunsido, gaja komedieto kaj disdono de elementaj E-diplomoj al 19 seminarianoj. Teknika Komerca Lernejo starigis elementan E.-kurson, kies inaŭguran lecionon faris Frato Severiano de Souza.

## ŜTATO RIO DE JANEIRO

*Resende* — Kelkaj esperantistoj, kadetoj de la Milita Akademio de Agulhas Negras — AMAN — serĉas la eblecon starigi Esperantan asocion ĉe AMAN. Por tio, ili klopodas por altiri la atenton de aliaj kadetoj kaj de la Akademia Komando. Unu el la iniciatoj estis parolado farita la 19-an de julio de la Kadeto Sérgio Nascimento al 60 kadetoj, unuajaraj lernantoj, sub la temo: Esperanto, língua internacional". Ĉeestis la paroladon du profesoroj pri portugala idiomo.

La administrantaro de Resende donis al placo de tiu urbo la nomon "Esperanto", sekve de la Rezolucio n-ro 425, de la 4-a de aŭgusto 1961.

## SÃO PAULO

"Centro Esperantista do Bancional Clube" inaŭguris sian unuan Esperantan ekspozicion, la 19-an de junio. Por la inaŭgura ceremonio la "Centro" invitis nian konatan sindonan samideanon Francisco de Souza Almada, kiu faris aplaŭditan paroladon pri la Zamenhofa internacia lingvo.

Nia sam. Nelson Silveira gvidas E.-kurson ĉe "Escola Técnica Bancária Bancional".

*Jundiaí* — Jundiaí Esperanta Klubo, fondita la 23-an de aprilo 1960, starigas senpagajn E. kursojn kaj klopodas por organizi ekspozicion de esperantaĵoj.

*Mogi das Cruzes* — La Junulara Departemento de la Spiritisma Centro Antonio de Pádua inaŭguris elementan E.-kurson ĉe la sidejo de tiu societo. Laŭ iniciato de nia sam Lacorday Andrade, ĝi funkcias, ekde julio, sabate (20-21,30 h) kaj dimanĉe (9-10 h.).

## PARANÁ

*Curitiba* — Nia sam. Auri Marcos Petroski aperigis en diversaj gazetoj de ĉi tiu ĉefurbo kelkajn artikolojn

pri Esperanto kaj ĝia 46-a Universala Kongreso en Harrogate, Anglujo.

*Paranavaí* — Sub la orientado de prof. Pedro Real funkcias: speciala kurso por kandidatoj al la antaŭenira ekzameno ĉe Filozofiaj Fakultatoj; kurso por ekzameno pri matureco (fine de la gimnazia kurso) — kaj Esperanto-kursoj.

## SANTA CATARINA

*Chapecó* — Rotario-Klubo de Chapecó omaĝis la 15-an de decembro de 1961 la naskiĝdaton de Zamenhof. Tiucele ili speciale invitis la Delegiton Gersi Alfredo Bays, kiu faris paroladon pri la kreinto de Esperanto, kaj pri la lingvo kaj movado. Ĉe la fino de la parolado multaj rotarianoj asertis, ke tiu parolado estis la plej bona farita en ilia klubo kaj multaj esprimis la deziron lerni la lingvon.

Ankaŭ la loka Radiostacio dissendis specialan artikolon verkitan de Gersi Alfredo Bays por tiu dato.

La E. — kurso ĉe la Normala Lernejo havis bonan rezulton. Bays ĝojas pro tio, ke li trovis bonan lernantinon, Serena Maria Grisa, kiu estas gimnazia profesorino. Ankaŭ aliaj lernantinoj tre interesiĝis pri Esperanto, kaj certe ne forlasos la aferon.

## GOIÁS

*Goiânia* — Nia samideano Aloysio C.S. Mello lernigas Esperanton en la Gimnazio Emmanuel al kvar gimnaziaj serioj, por 120 gelernantoj, per la lernolibro "Curso Prático de Esperanto".

*Itumbiara* — Faris ekzamenon kaj ricevis la oficialan diplomon la lernantoj, kiuj sekvis la elementan E.-kurson "Cruz e Souza", ĉe Centro Espírita Eurípedes Barsanulfo.

# NOVA PLACO ESPERANTO

En la 17-a de Decembro 1961 estis solene inaŭgurita Placo Esperanto en la urbo Resende. Tio efektiviĝis dank' al la klopodoj de la estraro de Resende Esperanto-Klubo, kiu aktive kaj sindone jam de longe batalas por tiu okazigo.

La festo de la inaŭguro estis dividita en tri partoj:

1-e) Oficiala inaŭguro de la tri ŝildoj fare de S-ro Augusto Pinheiro Carvalho, Urbestro de Resende, Dr. Carlos Domingues, Prezidanto de Brazila Esperanto, Ligo, kaj S-ro Heitor de Oliveira Ramos, prezidanto de la urba Konsilantaro.

2-e) Disdonado de diplomoj al jenaj lernantoj, kiuj ĵus finis la elementan kurson de Esperanto: Pedro Márcio Braile, Carlos Pulstinic, Geralda Bianguli Palhas, Darcila Maria Galvão de Souza, Maria Amélia Alves, Melanie Tavares, Wilson Uchôa Colares, Aurélio Flávio Charão, Sérgio Gilberto Taboada, Danilo Carvalho Vilela, Eloy Carvalho Vilela, Sérgio Carvalho do Nascimento kaj Ildefonso Bezerra Falcão.

Post la disdonado de la Diplomoj okazinta en la aŭditorio de Radio Agulhas Negras el Resende (ZYP-22), estis prezentita arta horo, kiu multe ravis la ĉeestantaron.

3-e) La estraro de Resende Esperanto-Klubo regalis la invititojn per tre varia kaj bongusta lunĉo en atmosfero de frateca amikeco.

En la festo ĉeestis, interaliaj, la sekvantaj reprezentantoj de esperantistaj asocioj: Brazila Esperanto-Ligo, Caxambu Esperanto-Klubo, Volta Redonda Esperanto-Klubo, Nova Iguaçu Esperanto-Klubo, Luma Res-

tadejo kaj multaj unuopaj esperantistoj.

Kiel parto de la solena tago la Estraro de Resende Esperanto-Klubo laŭ ĝia Regularo deklaris Honoraj REK anoj pro ilia kunlaboro por Esperanto, tre gravajn personojn, nome : S-ro Augusto P. de Carvalho, Urbestro de Resende, S-ro Heitor de Oliveira Ramos, Prezidanto de la Urba Konsilantaro, S-ro Odilon Motinha, Urba Konsilanto, S-ro Pedro Braile Neto, Urba Konsilanto, S-ro Arisio Maciel, Arta Direktoro de ZYP-22 kaj S-ro Ademar Vieira, Direktoro de la ĵurnalo *A Lira*.









*FOTOJ — 1. Sur la podio antaŭ la placo Esperanto, de maldekstre dekstren F-ino Irani Baggi de Araujo, D-ro Luiz Alberto Brandão Martins kaj D-ro Carlos Domingues, kasistino, sekretario kaj prezidanto de BEL, S-ro Heitor de Oliveira Ramos, prezidanto de la Urbakonsilantaro, kaj lia edzino, S-ro Augusto Pinheiro de Carvalho, urbestro de Resende, parolanta antaŭ la mikrofono, kaj S-ro Olívio Storte, prezidanto de REK. La aliaj personoj estas diversaj reprezentantoj de Esperantaj-Societoj.*

*2. La bonega muzikistaro de Milita Akademio de Agulhas Negras, kiu briligis la feston.*

*3. La Urbestro malkovras la unuan el la tri ŝildoj kun la nomo "Praça Esperanto".*

*4. En la soleno de la disdonado de diplomoj, en la aŭditorio de radistacio Rádio Agulhas Negras de Resende, la prezidanto de BEL parolas antaŭ la mikrofono.*

Livros de Esperanto acham-se à venda, entre outras, nas seguintes grandes firmas :

LIVRARIA ACADÊMICA
Miguel Couto 49 — Rio de Janero

LIVRARIA UNIVERSITÁRIA
Pres. Faria 191 — Curitiba

LIVRARIA DO GLOBO
Andradas 1416 — Porto Alegre

# APERFEIÇOE O SEU CONHECIMENTO

## EMPRÊGO ÚTIL DO TEMPO

— "Quanta cousa eu faria, se tivesse tempo!" — "Se não fossem as minhas obrigações rotineiras, eu me teria dedicado ao estudo de assuntos de minha predileção!" Assim dizem e assim ouvimos falar, tantas vêzes, pessoas que, como nós, vêem frustradas as suas melhores aspirações, destruídos os seus grandes castelos! Lamentam-se da falta de tempo, e no entanto deixam que êle se escoe, como os filetes de areia sêca, de entre os dedos de mãos fechadas Mais acertado queixarem-se, não tanto da falta de tempo, como da falta de método em aplicá-lo. A grande maioria não sabe fazer emprêgo útil do tempo; desconhece a maneira de aproveitar os minutos que, somados, perfazem horas. Quantas vêzes se observa a pressa azafamada de um indivíduo que se mortifica para alcançar um trem que deve partir às 5 horas da manhã, só porque não soube dispôr do tempo de véspera, consumido em ocupações desnecessárias?

O tempo, como o dinheiro, dá juros, quando poupado. Quem cedo se deita, cedo se levanta; quem se previne de véspera, não se preocupa na última hora.

Na boa e regular distribuição dos afazeres diários reside o segrêdo da capacidade e do rendimento do trabalho espiritual e manual.

Ruy Barbosa, madrugador impenitente, na sua oração aos moços, concita-os a adotar o seu método, afim de aumentar a colheita nas searas do pensamento:

"O amanhecer do trabalho há de antecipar-se ao amanhecer do dia. Não vos fieis muito de quem esperta já sol nascente, ou sol nado. Curtos se fizeram os dias, para que nós os dobrássemos, madrugando."

*Renato Kehl*

*No número seguinte daremos a versão dêste trecho, em Esperanto.*

# ANTAŬEN!

*Mons. Henrique de Magalhães*

Ĉu vi ĝis nun sekvis la ordinaran vojon de tiuj, kiuj neniam havis preman zorgon, nek lumigis la animon per la lumo de idealo?... Turnu en alian direkton.

Ne timu la supreniradon!

Amu la belecon de la altecoj!

En vi dormetas fontoj de mil energioj. Vundu vian koron per la mireginda vergo de firma rezolucio, kaj vi vidos kiel tuj spruĉos kristalopura akvo, kiu donos al vi forton por entrepreni la plej impetegajn batalojn por la akiro de la idealo.

Ne estu malkuraĝa!

Ĉu ekkaptis vin la doloro? Ĉu superregis vin la korpremeco? Ne rigardu la teron! Admiru la altojn... De Dio, kiu estas via Patro, vi estos konsolata.

Ĉu estas malfacila, ĉu estas neatingebla la montaro?... Tamen... nur la unua paŝo estas malfacila al ni. Komencu! Leviĝu... marŝu... kaj via estos la VENKO!

Esperantigis *Lila Teixeira*

El la libro *"Aos que sofrem"* (Al tiuj, kiuj suferas).

# LA KONKURSA PREDIKANTO

Informoj de la elpensinto de la GRANDA TUTMONDA POŜTMARKO-KONKURSO, s-ano Gersi Alfredo Bays, Delegito de UEA, en Xapecó, Brazilo. Leteroj, pm kaj bk, ĉio estas vantaĵo. Kolekti tiom da paperaĵoj por ekspozicio, vantaĵo de vantaĵoj, ĉio estas vantaĵo. Kian profiton havas mi de ĉiuj miaj laboroj, kiujn mi laboras sub la Verda Stelo? Leteroj foriras kaj leteroj alvenas, kaj la E-movado restas la sama. Mi sendas cirkulerojn, pagas anoncojn, kaj al mia urbeto leteroj rapidas, kaj tie ĉi ili restas. Leteroj el sudo, kaj leteroj el nordo, kaj el ĉiuj parto de la mondo; el landoj najbaraj kaj el landoj hotentotaj; de knabo 8-jara kaj de veteranino 87-jara; de poetino, kiu prikantis la konkurson per originalaj versoj, kaj de eternaj komencantoj; de eminentulo Akademiano, kaj de samideano, kies lingvon mi ne sukcesis rekoni; de katolikaj pastroj, kaj de komunistoj de Kruscev; alvenis multaj gratulleteroj, sed alvenis kelkaj tre ofendaj. Alvenis belegaj kovertoj tutkovritaj per dekoj da pm, kaj koverto per unu sola pm, kiun poŝtisto forprenis; kovertoj grandegaj kun enhavo nenia, kaj kovertoj malgrandaj kun cento da pm; koverto kun 208 pm kaj alia kun nur 4. Longaj leteroj alvenis, kaj alvenis kovertoj sen leteroj; iu sendis leteron kun 8-foje stampita adreso, kaj alvenis koverto plena de pm, sed sen la adreso de la sendinto. Kelkaj leteroj miaj revenis al mi, kaj mi sciiĝis, ke leteroj al mi senditaj reiris al la sendintoj; kaj certe multaj leteroj alvenos post la tago de la konkurso. Multaj leteroj alvenis al mia poŝtkesto, sed mia poŝtkesto ne pleniĝis. Ĉiuj aferoj estas lacigaj; ne satiĝas la okulo de vidado de tiom da pm, kaj ne pleniĝas la albumo de mia kolekto. Kio estis tio estos; kaj kio estis farata, tio estos farata; kaj ekzistas nenio nova sub la Verda Standardo. La konkurso, kiu estis farata, estos farata denove en 1962. Ekzistis mia konkurso kun 103 premioj, pri kiu oni diris: vidu, ĉi tio estas nova; sed la Majstro faris tion jam en la malnovaj tempoj de 1887.

Mi, la aŭtoro de la konkurso, estis Delegito super la samideanoj en Xapecó. Kaj mi decidis en mia koro esplori kaj ekzameni per ruzeco ĉion, kio fariĝas en la pm-kolektado: ĉi tiun malfacilan okupon Esperanto donis al la Esperantidoj, por ke ili turmentiĝu per ĝi. Mi vidis ĉiujn aferojn, kiuj fariĝas en tiu negoco; kaj jen, ĉio estas vantaĵo kaj entreprenoj ventaj. El mia poŝo eliris mono de Dumviva Membro de UEA; sed kiam mi dediĉis min por ekkoni la valoron de la 6 468 ricevitaj pm, mi eksciis, ke ankaŭ ĉi tio estas senvaloraĵo. Ĉar ĉe multe da pm estas multe da zorgemeco; kaj, kiu plimultigas siajn pm, tiu plimultigas siajn dolorojn. Pri la pm mi diris: Ili estas sensencaĵo! Kaj pri la ekspozicio: Kion ĝi havigas?

## DEZIRAS KORESPONDI KUN BRAZILANOJ

Pro la GRANDA TUTMONDA POŜTMARKO-KONKURSO s-ano Gersi Alfredo Bays ricevis multajn petojn por korespondado. Ĉar li ne povas korespondi kun ĉiuj, tial li publikigas la subajn adresojn, kun la peto, ke aliaj brazilanoj (aŭ sudamerikanoj) skribu al ili. Pro manko de spaco ni informas nur la aĝon.

EL ĈEĤOSLOVAKIO:

S-ro Seidler Zdeněk — Těškovice 70 — OPAVSKO.

F-ino Ela Hĝjková (17j) — Strato de 5. května 355 — MILEVSKO.

F-ino Anno Cmuntová (16j) — p. Hrejkovice — u Milevska — NÍKOVICE.

F-ino Zdena Strejcová (16j) — Stalinova 405 — MILEVSKO.

F-ino Marie Barešová (16) Str. de Čsl. armády 754 — MILEVSKO II.

S-ro Josef Fara (28) — Bezručova 768 — MILEVSKO II.

S-ro Václav Král — Stalinova 507 — MILEVSKO

S-ro Ernesto Geleta — Petöfi str. 15, A/4 — NOVÉ ZÁMKY.

Láda Vorišek — Na vyhlídce 8 — ZNOJMO.

S-ro Petr Fišera (38) — Koněvo nábr. 19 — TRUTNOV.

S-ro Ladislav Fogl — Lina 04 — NOVÉ MESTO n/m.

S-ro Stanislav Štefan — ul. Ivana Olbrachta 189/34 — KLADNO.

S-ro Miloslav Hanuš — Nymbuk P. Bezruče 1766.

EL GERMANUJO

S-ro Hch. Schnorrenberg — Vulkanstr. 2 — (216) DORTMUND-HOMBRUCH.

S-ro Bruno Siegert (68) — Marienstr. 32 — FÜRTH i. BAY.

S-ro Richard Vluka — Hallerstr. 54 — BRACKWEDE

S-rino Blanka Devčič-Becker — Goethestr. 51 — (16) PFUNGSTADT-HESSEN.

S-ro Hans Flassbeck — BONN a./RHEIN.

S-ro Willi Bandel — Marienstr. 88 — KARLSRUHE i. B.

EL HISPANUJO

S-ro J. Ernesto Guillem — Marqués de Caro, 6, 2a — VALENCIA.

S-ro Vicente Garcia — Valle 9 — TARRASA (Barcelona).

S-ro Eduardo Verdú (64) — Dr. Lluch 18-7a. — Cabañal — VALENCIA.

S-ro Julian M. Arroyo — Plaza San Miguel 1 — 3.º, Dcha — OVIEDO

*EL POLLANDO*:

S-ro Atanislaw Rudnicki — ul. Niska 14/27 — WARSZAWA.

S-ro Piotr Adolph (19) — str. Augustynskiego 1 — GDANSK.

S-ro Marian Fiksa (12) — ul. Dworcow 6 m 3 — ZSAMOTULY WKLP.

S-ro Kolodziej Konstanty — ul. Fabryczna 3/1 — KAMIENNA GÓRA.

S-ro Jósef Raczek — Piotrkowska 211 — LODZ.

S-ro Slawomir Lowczak (19) — str. Piekna 7 m 1 — LUBLIN.

S-ro Józef Gasiorowski (19) — ul. Przedzamcze 15 w — TORUN.

S-ro Eugeniusz Majewski (lernantoj 15-100j) — ul. 1-go Maja 43 m 2 LUBLIN.

DEZIRAS KORESPONDI KUN BRAZILANOJ

(ĉiuj 14-j): S-ro Bulzacki Janus, F-inoj Pakulska Miroslava, Malenta Anna, Kariorowska Teresa, Pakulska Krystyna, Golab Maria — ĉiuj: Powiatowy Dom Kultury — LASK.

S-ro Joachim Malejka — ul. H. Sawickiej 26 — ZABRZE.

Esperanto-rondo — Inst. Chem. Przer. Wegla — ul. Zambowa 1 — ZABRZE.

EL BULGARUJO

S-ro Dimitr Ivanov (kaj liaj multaj gelernantoj) — Vardar 3 — RUSE.

S-ro Liubomir Kr. Leviĉaroff — ul. Iu. Nenof 11 — PAZARĈIK.

S-ro Dimitr Matev (30) — str. Carkovna Nezavisimost 5 — RUSE.

S-ro Atanas Dove — Brezovska 29 — PLOVDIV 6.

S-ro Ivan Ĉunĉev (27) — str. Ribarks 19 — VIDIN.

S-ro Vasil D. Velĉev — str. Partizanska 16 — GABROVO.

EL SOVETIO:

F-ino Stotnikova Tatjana (21) — Respublikanskaja d. 97a, kv. 2 — JAROSLAVL.

F-ino V. S. Ivanova — Abonementnij jasĉik N 972 — LENINGRADO "F-2".

S-ro Petras Rukŝena — Sodu 7 — 2 — VILNIUS 30 — Litovio.

S-ro Z. Rubazeviĉ — str. Gorkio 52-60 — VILNIUS 24 — Litovio.

S-ro Alfredas Otas (16) — poŝto Vaiĉaiĉiai — Skuodo rajonas — Litovio.

EL JUGOSLAVIO:

S-ro Zvonimir Lucovic (18) — (kaj multaj gekolegoj) — Daĉki dom — MOSTAR.

S-ro Zvonimir Maric (17) — (kaj multaj gekolegoj) — Gradevinski centar — MOSTAR.

EL FRANCUJO

S-ro Bernard Mazelier — 18 rue D. Plichon — CRÉTEIL (Seine).

S-rino G. Roux — 29 rue de la Croix Verte — SAUMUR (Maine-et-Loire).

F-inoj 14-17 jaraj: Collége d'enseignement Technique — rue de la Censerie — ANGERS.

S-rino E. Chérie (65) — 12 rue Conseil — BAYEUX — Calvados.

S-ro Michel Theveneau (28) — Les Genévriers — VILLIERS LE LAC — Doubs.

EL HUNGARUJO:

S-ro Laduslau Maurer (17) — János str. 5 — VESZPRÉM KISS.

S-ro Abonyi Árpád (40) — Pf. 27 — VÁRPALOTA.

S-ro aleksandro Kelemen (49) — Vadász 8 — SZEGED.

S-ro Árpád G. Poloskey — Pk 6 — BUDAPEST 119.

S-ro Bálint R. Zoltán (30) — kilián Gy. v.2.I.10 — VÁRPALOTA I.

Antonio Kiss (13) — Reményi u.6 — MISKOLC.

Csongor Molnár (14) — Petöfi u. 23 — MISKOLC.

Ladislao Vári (11) — Medgyesi F. u. 12 — Pf 10 — MISKOLC.

*El aliaj landoj* s

S-ro Joŝi Jamamura (50) — FUNAM — TOYAMA — Japanujo.

S-ro Erling Larsen (45) — Borggaaro — Slerslev — St. Hedinge — Danlando.

S-ro Ildefonso Nuñez — Apartado 250 — BARQUISIMETO — Venezuelo.

K. Immink — Gaesbeestr. 8 b — ROTTERDAM (20) — Holando.

S-ro Huyghe Frederik — Steenweg op Wingene 300 — BEERNEM (W-VL) — Belgujo.

S-rino Betsi Rynvis — Apeldoornselaan 180 — DEN HAAG — Holando.

S-ro Dave H Withey — 21 Brookfield Ave. — Waterloo — Liverpool — Anglujo.

S-ro Severino Bianconi (18) — Via Ludovico Calda 3 G/3 — GENOVA-SESRI — Italujo.

S-ro W. F. Pilger (19) — Vermeerstr. 7 — ZAANDAM — Holando.

Beatrice A. Marinaro — V. F. Corridoni 11 — Martirone — Brescia-Italujo.

S-ro J. M. v. d. Lubbe — Plantagemiddenlaan — AMSTERDAM C 30 I — Holando.

F-ino Ann Traill (13) — 8 Benjafield Terrace — Mount Stuart — NEW TOWN — Tasmania — Aŭstralio.

SE VI NE ŜATAS PREDIKE, VI ŜATAS STATISTIKE

(aldono al la Esperanta Proverbaro)

550 cirkuleroj dissenditaj. 36 responditaj (nur!). Valoris anoncoj. 140

samideanoj el 26 landoj sendis 6.468 pm per 196 kovertoj kaj aldonis 54 bk, 86 alumetetikedojn, 4 urbprospektojn kaj 149 propojn por korespondado.

El Germanujo mi recevis la plej grandan kvanton (1.022pm).

Nenion mi ricevis el Argentino, Kanado, Portugalujo, Grekujo, Norvegujo, Rumanujo, Israelo, Libano, Ĉinujo, Vietnamio, Aŭstralio.

El kelkaj landoj oni povis sendi pm nur *SUR* kovertoj, kaj oni devis sendi dekojn por atingi 50 pm, tamen kelkaj tion faris.

La lotumado okazis dum kunveno de Rotario-klubo, al kiu mi estis invitita fari paroladon pri Zamenhof.

S-ro E. Zuberbühler el Ebnat Kappel, Svisio, sendis la plej grandan sumon, kaj tiamaniere gajnis la abonon al HEROLDO DE ESPERANTO.

50 samideanoj sendis pli ol 50 pm kaj kune atingis 69 n-rojn por konkursi al LA PRAKTIKO, kiun ricevis s-ro Baldur Ragnarsson el Kópavogur, Islando.

13 samideanoj sendis pli ol 100pm kaj ili meritis specialan premion: mi aldonis abonon al BRAZILA ESPERANTISTO, kiun ricevis s-ro Werner Heimlich el Soltau, Germanujo.

La urbo, kiu sendis la plej grandan kvanton entute (243pm) estas HARTFORD (Usono), kaj tie Trudy Stoutenburgh gajnis la abonon al. KOOPERATIVISMO.

Por la 100 libroj oni atingis 490 n-rojn. Mezkvante oni sendis 46pm. (La sumo estas bela, sed ne la nombro de la sendintoj).

La fortuno favoris jenajn nomojn (parenteze la nombro de libroj):

Vicente Garcia (2) — Erling Larsen (2) — Severino Bianconi (2) — P.M. den Toonder (2) — A. Frangeul (1) — E.rondo en Zabrze (1) — K. Chovan (1) — Petro Frolov (2) — Alfred Bräuer (2) — Werner Heimlich (3) — Ida Lisiĉnik (2) — Lieselotte Fett (4) — Hans Flassbeck (1) — Hub. Weltens (1) — Paolo Bonomi (1) — Bruno Siegert (1) — Jo. Holdinger (1) — S. Boev (1) — Ladislav Fogl (1) — H. W. R. Peterson (2) — Xavier Dauchez (1) — Antonio Khirer (2) — Stanislaw Rudnicki (2) — Václav Král (1) — J. Kondor (1) — Fr. Cunderla (2) — Gorazd Hofer (1) — Abonyi Árpád (1) — Huyghe Frederik (1) — G. Kalkman (1) — Stanislav Stefan (1) — Lino Moulines (1) — Miroslav Hanŭs (1) — Svonimir Maric (1) — Svonimir Lucovic (1) — Julio Camarero (2) — Maria Mozdzen (1) — Z. Rubazevic (1) — Roberto Lavallée (1) — Eugeniusz Majewski (2) — W. F. Pilger (1) — Maria Vogel (1) — Zladislaw Glajcar (2) — J. H. Morreau (2) — E. Chérie (1) — Pantic Kreŝo (1) — Blanka Devĉic-Becker (2) — Trudy Stoutenburgh (2) — Stuart Kittredge (2) — H. Monrad Christensen (1) — Vladim Donec (1) — Michel Theveneau (2) — G. Vanbreuse (2) — Janis Kulitans (1) — Richard Vluka (1) — E. Zuberbühler (4) — Annie Raffaud (2) — Julian M. Arroyo (1) — Baldur Ragnarsson (1) — Franz Singer (2) — Otto Böhm (1).

LASTAJ NOTOJ:

Ĉiuj partoprenintoj en la konkurso (premiitoj aŭ ne) ricevos ekz. de BRAZILA ESPERANTISTO, kiu plene raportas pri mia konkurso. — Dankon al ĉiuj helpintoj! — Pri la ekspozicio mi faros specialan raporton, kun fotoj. — Se iu deziras pliajn informojn, bonvolu sin turni al

*Gersi Alfredo Bays*
Caixa Postal 74
CHAPECÓ — SC/Brazilo

# BRAZILA KLUBO ESPERANTO

## VOJAĜO

Nia prezidanto Prof. J. B. Mello e Souza vojaĝis en Usonon en la fino de Septembro, portante la saluton de B.K.E. al la tieaj esperantistoj. Li restos tie kelkajn monatojn kaj kiam li revenos ni certe ĝuos la agrablan rakontadon de liaj spertoj.

## VIZITO

La 16-an de Decembro Frato Adalto Rodrigues, membro de SEMO, Seminariana Esperantista Movado, vizitis nian sidejon kaj partoprenis la kunvenon omaĝe al la datreveno de Zamenhof. La vizitanto faris malgrandan paroladon pri Monte Santo de Minas kaj pri ĝia esperantista movado, kiu disvolviĝas ne nur en Seminário Sacramentino B. Eymard sed ankaŭ inter la loĝantoj de la urbo. Sekvis konversacio kun interŝanĝo de ideoj pri esperantistaj kunvenoj. Frato Adalto prezentis ludon por komencantoj, kiu tre sukcesis en SEMO kaj la membroj de B.K.E. siavice montris al la vizitanto ludon pri proverboj. Tre agrabla kaj profita estis la vizito de Frato Adalto Rodrigues.

## LUDO PRI FRAZOJ (daŭrigo).

— Ho, sinjoro, vere vi eltrovis ion de unu el la plej kleraj saĝuloj en ĉiuj tempoj! Ĝi estis PLATONO kiu diris tion. Ĉu ne vere? Tamen, el la greka literaturo mi preferas ion pli viglan, pli energian.

(— Tre bone; mi kelkfoje timas pro trouzo de energio... Mi aŭdos vin kun plezuro.).

— Dankon. Mi ĉiam admiris tiun ĉi frazon:

*Aŭdu, sparta junularo; la vivo sen honoro valoras nenion pli!*

— Ho, sinjoro! Ĉi tiun lastan verson de fama poemo de TIRTEU en la nunaj tempoj oni eĉ ne komprenas, ĉar la nuna regulo preferinde diras: *"La vivo sen mono, (kaj multe da mono) valoras nenion pli..."* Tiu afero pri honoro fariĝis tedema kaj ĝeniga malnovaĵo... Kompreneble estas esceptoj... Sed la historio de Tirteu apartenas al la legendo... Nur du strofojn oni konas, de tiel fama poeto. Mi preferas iun pli veran kaj modernan.

(— Bonvolu do modernigi la atmosferon, sinjoro...)

— Jen mia sugestio:

*Mi kredas je la ĉiopova libereco, kiu kreas la verajn glorajn naciojn; mi kredas je la leĝo, ĝia unua nepra kondiĉo.*

— Ho, sinjoro! Bravege! Feliĉan ideon vi havis eldirante la unuan sentencon de "POLITIKA KREDO" de nia granda RUI BARBOSA! Prave oni diradis en radiprogramo: Vera homo estis Rui! Tamen mi konsilas al vi esti prudenta, tial ke citi Rui-n povus ŝajni enŝovo en politikajn aferojn.

(— Jes, mi scias, ke tio estas ne nur danĝera sed ankaŭ malpermesata en nia klubo. Ni atendas do frazon devenintan el via notinda prudenteco...)

— Jen ĝi estas, amiko:

*Malriĉe sed trankvile vivis tiu, kiu sur sia modesta tablo konservas saluton iam apartenintan al lia patro...*

(daŭrigota)

---

(Continuação da pág. 7)

alma e com o coração, as minhas saudações efusivas, com um abraço de incondicional solidariedade a todos os congressistas do nosso XVII, fazendo votos pelo mais completo sucesso do nosso magno conclave.

Recife, Pernambuco.

*Thomaz Tenório Villa Nova* — Delegito de UEA.

# DIPLOMOJ

Faris ekzamenon kaj ricevis diplomojn jenaj esperantistoj :

## NORMA ELEMENTA DIPLOMO

*Brazila Klubo "Esperanto", Rio de Janeiro.*

Evaristo Manoel Pereira, Aderaldo Rocha, Venilton de Sousa Ferreira, Jair Lucena, Jovino Lobato Marques, Luís Carlos Stamato Marcelino de Carvalho, Black Ghidalevich, Dario Monteiro, Alice Thieme.

*Federação Espírita Brasileira, Rio de Janeiro, pere de Brazila Klubo "Esperanto" :*

Lilo Castelão.

*Bangu Atlético Clube, Rio de Janeiro, pere de Brazila Klubo "Esperanto" :*

Ivan da Cruz Mendes, José Mauro Rosa.

*Sociedade Mineira de Esperanto, Belo Horizonte.*

Bethel do Prado Prazeres, Tito Livio Sales Oliveira, Clotilde do Prado Prazeres, Nelson Alves Soares, José da Silva Couto Sobrinho, Hortência Caldeira Cruz, Heleny Moreira de Carvalho, Luci Braga, Roberto Loureiro Peres, Benedito Ribeiro, Nũncia Dauria Ravasco.

*Uberlândia Esperanto-Klubo, Uberlândia.*

Elisa Marquez de Sousa Carracedo, Ana Maria Rodrigues Alves Marquez, Antônio Mendes dos Santos, Carlos Hugo Bertoluci, Angélica Alessandri Aspesi, Alice Vilela Mendes, Maria Olímpia da Silva, Mércia Ferreira Cordeiro, Carmen Lúcia Silva, Maria Carmen Ferreira Silva, Rosilene Ferreira Silva, Darcy de Sousa, Zenisse Martins Pereira, Linda Batista de Almeida, Edma Márcia de Moraes, Moacir Zanoni, Luís Kardec dos Santos, Osvaldo Teodoro de Lima, Marlene de Carvalho, Vicente Carlos da Silva, Zenad Teodoro dos Santos, Eleuda Maria Alves, Erico Vilela Marquez.

*Resende Esperanto-Klubo, Resende, RJ:*

Álvaro da Graça Monteiro, José Haroldo Gomes, Margarida de Aguiar Rosas, Maria Teresa de Carvalho, Maria da Cruz Sousa Jesus, Maria Piedade de Oliveira, Nerilda Muela Camejo, Miriam Pereira Gomes de Oliveira, Osvaldo Miguel de Jesus, José Manoel de Andrade, Sérgio Carvalho do Nascimento, Sérgio Gilberto Taboada, Wilson Uchôa Colares, Danilo Carvalho Vilela, Geralda Biangulli Palhas, Eloy Carvalho Vilela, Aurélio Flávio Charão, Maria Amélia Alves, Ildefonso Bezerra Falcão, Darcila Maria Galvão de Sousa, Pedro Márcio Eraile, Melanie Tavares, Chelman Pustilnic.

*Centralina Esperanto-Klubo, Centralina, MG*

Geraldo José de Gouvêia, Jeremias de Freitas Filho, Nair Lúcia de Andrade, Arão Rafael Rodrigues, Mario Onofre de Faria, Francisca Figueira Queiroz, Jacinto Ferreira, Ivany Barbosa Pôrto, Adiná Rodrigues de Jesus, Alan Kardec Garcia, Jerônimo Barale de Sousa, Regina Andrade Branquinho, João Dias Ramos, Amadeu de Carvalho Alencar, Julieta Marquez de Oliveira, Osória Borges Faria, Tarcisio José Medeiros, João Dias Ramos Júnior.

## PER KORESPONDADO

Antônio Alfonso, Lins, SP.

Humberto Munary Tedesco, São Paulo.

José Muniz da Silva, São Lourenço, MG.

Ecio Poggetti, Campinas, SP.

Aloísio Correia dos Santos Melo, Goiânia.

Manoel da Silveira, Pôrto Alegre.

Walter Augusto Francini, Pôrto Ferreira, SP.

Omar Silva, Volta Redonda, RJ.

Italo Peccioli, Jaú, SP.

*Ĉe Verda Stelo Esperanta Societo, São José dos Campos, SP :*

Francisca Rodrigues Pinto Faria, Miguel Lady, Keico Haibara, Tabajara de Moraes Ricciardi, Miguel Rodrigues, Geraldo Mesquita Soares, Haydée Machado Freire, Adarica Teixeira Soares.

*Ĉe Taubaté Esperanto-Klubo, Taubaté, SP :*

José Lopes Silva, Maria Aparecida Lopes Silva, Ernesto Floriano de Sousa.

*Ĉe SEMO, Monte Santo de Minas, MG :*

Plínio Ignacio Becker, Francisco Tarcisio Marques Cavalcante, Francisco Walmar Lima Cavalcanti, Onofre Ferreira Cinza, Adauto Maurício Coelho, Antônio Luís Falchetto, Antônio Guedes da Fonseca, João Pedro da Fonseca, Manoel Pereira de Freitas, Adilson Gava, Raimundo Arilo da Silva Gomes, Deoclécio Grilo, Adalto Rodrigues Martins, Adroaldo Paulo Mazzarino, Ivo dos Santos Passos, Ilário de Sousa Pinto, José Francisco Diôgo da Silva, João Batista Vasconcelos, João Lúcio Versiani, Pedro Franco de Paula Cavalcante, Pedro Cerri, Liberato Paulino da Costa, Cléa Lúcia da Silva Faria, Nilva Luz de Faria, Sílvia Maria da Silva Faria, Alice Maria Faria Pereira, Luís Teixeira Furtado.

*Ĉe Escola Normal "Chapecó", Chapecó, SC :*

Serena Maria Grisa, Edite Teresinha Nicknich, Edite Maria d'Aquino, Dione Isabel Nicknich, Maria Elena Wagner, Rejane Teresinha Pereira, Elaine Maria Silvestri, Nelcy Helena Fin, Valesca Carmen Reschke, Tarcila Boff, Geni Eckstein, Joaquina Teresinha Matos, Dulce Maria Stoffel, Lucy Padilha, Leonita Dina Favaretto.

NORMA SUPERA DIPLOMO

*Brazila Klubo "Esperanto', Rio de Janeiro.*

José Antônio de Albuquerque
Marta Seyr
Iolanda Evangelista da Silveira

*Per korespondado :*

José Vigh, Macaé, RJ.
Carolina Maia Leitão, Rio de Janeiro.
Edina de Barros Reis, Ubá, MG.

*Ĉe Eymard Esperanto-Klubo, Monte Santo de Minas, MG :*

Adauto Maurício Coelho, Adilson Gava, Adroaldo Paulo Mazzarino, Antônio Luís Falchetto, Francisco Tarcisio Marques Cavalcante, Francisco Walmar Lima Cavalcanti, Ilário de Sousa Pinto, João Batista Vasconcelos, Ivo dos Santos Passos, João Lúcio Versiani, João Pedro da Fonseca, José Francisco Diôgo da Silva, Manoel Pereira de Freitas, Onofre Ferreira Cinza, Plínio Ignácio Becker, Raimundo Arilo da Silva.

*Ĉe S.E.M.O., Monte Santo de Minas, MG :*

Paulo Roberto de Magalhães Arruda, Maria Aparecida Estêves, Liberato Paulino da Costa, Cléa Lúcia da Silva Faria, Nilva Luz de Faria, Sílvia Maria da Silva Faria, Zilfa Lattaro Novelli, Alice Maria Faria Pereira, Teresinha Rodrigues, Eunice Marino Ribeiro, Ivete Ribeiro, Ivani Ribeiro, Sônia Sant'Ana, Fábio Ribeiro Soares, Adalto Rodrigues Martins, Antônio Guedes da Fontoura.

NORMA PROFESSORA DIPLOMO

Manuel Alves Carneiro, Rio de Janeiro.

## DELEGADOS DE UEA NO BRASIL

Segundo o *Jarlibro* da Universala Esperanto-Asocio para 1961, existiam no Brasil, além de um Delegado-chefe, 124 Delegados do Movimento Esperantista, assim localizados:

PARÁ — Belém 1.
CEARÁ — Fortaleza 2, Baturité 2, Limoeiro do Norte 2.
RIO GRANDE DO NORTE — Natal 2.
PERNAMBUCO — Recife 1. Petrolina 1.
ALAGOAS — Maceió 2.
BAHIA — Salvador 7. Feira de Santana 1. Itabuna 3. Mataripe 2. Santo Amaro 1.
MINAS GERAIS — Belo Horizonte 8. Caratinga 3. Governador Valadares 1. Juiz de Fora 4. Pompéu 2. Tupaciguara 1. Ubá 2. Uberaba 1. Uberlândia 1.
RIO DE JANEIRO — Niterói 2. Araruama 1. Barra Mansa 1. Macaé 1. Nilópolis 1. Resende 1. Volta Redonda 3.
GUANABARA — Rio de Janeiro 23.
SÃO PAULO — São Paulo, 5. Americana 1. Campinas 2. Itapetininga 1. Jaú 1. Ourinhos 1. Santo André 3. Santos 4. São João da Boa Vista 1. Tanabí 1. Votupuranga 1.
PARANÁ — Curitiba 5. Paranavaí 2.
SANTA CATARINA — Florianopolis 2. Xapecó 1.
RIO GRANDE DO SUL — Pôrto Alegre 5. Bajé 2.
GOIÁS — Goiânia 1.
RONDONIA Guajará-Mirim 2.

# LA GRANDA KONKURSO – 205 Premioj

Mi volas festi kun vi la 15-an de decembro 1962. Partoprenu en la konkurso kaj vi povos gajni librojn kaj abonojn al revuoj; per tio vi ankaŭ helpos min aranĝi plibone mian E-ekspozicion.

*35 abonoj al la revuoj* (po kvin): Brazila Esperantisto — Heroldo de Esperanto — La Praktiko — Sennaciulo — Kooperativismo — Espero Katolika — El Popola Ĉinio.

*170 valoraj libroj el Brazilo*: (po 10) Rui Barbosa — Biografia Eseo (286 p), Antologio de Brazilaj Rakontoj (309 p), Teatro (M. Assis — 159 p), Memorlibro de la 3-a E. E. Mondkunveno (215 p); 30 La Nigra Spartako (75 p) kaj 100 Miniaturoj (77 p).

*TRE FACILE PARTOPRENEBLA KONKURSO*:

1 — Sendu minimume 3 bk aŭ 30 malsamajn pm kaj vi konkursos per 1 n-ro al la 170 libroj. Por ĉiu plia bk aŭ deko (10) da pm vi ricevos plian n-ron.

2 — Por konkursi samtempe al la abono al la 35 revuoj sendu minimume 5bk aŭ 50 pm.

3 — Vi povas sendi bk kaj pm kiom da fojoj vi deziras.

JU PLI MULTE VI SENDOS, DES PLI MULTAJ VIAJ ŜANCOJ.

*Partoprenu amase! Ĉiuj anoj de via klubo!*

Vi povas proponi korespondadon kun miaj gelernantoj (15-25 jaraj)

Ne forgesu skribi preslitere vian adreson!

Ĉion sendu antaŭ la 15.12.62.

**Gersy Alfredo Bays**
**Caixa Postal, 49**
**CHAPECÓ — SC**
**BRAZILO**

---

Depois do aparecimento do JARLIBRO a revista Esperanto continuou a publicação dos nomes dos novos Delegados.

Os países que tinham maior número de Delegados eram, por ordem decrescente França, Alemanha, Suécia, Grã-Bretanha, Itália, Holanda, Estados Unidos, Polônia, Finlandia e Brasil, seguindo-se mais 53 países.

A rede de Delegados constitui por si mesma uma prova de que o Esperanto não é simplesmente "a língua do futuro", como admitem alguns, mas também um meio de comunicação que já pode ser usado, no presente, larga e eficazmente .

Por isso a Liga Brasileira de Esperanto reitera o convite que constantemente faz para que os esperantistas exerçam o honroso e útil cargo de Delegado.

GEEDZOJ ESPERANTISTAJ

Kiuj povas loĝi kaj zorgi la HEJMON de la INFANO FELIĈA (Lar da Criança Feliz) bonvole skribu al ni.

KOMUNUMO ESPERANTISTA

R. Prof. Costa Mendes, 441
Fortaleza — Ceará — Brazilo

(Ni deziras personojn kiuj parolu nur esperante al la infanoj).